

30 jarojn *Esperanto aktuell*, revuo de Germana Esperanto-Asocio

30 jarojn aĝas nun *Esperanto aktuell*, nia membro-revuo, kaj okaze de tiu jubileo valoras ioma retrorigardo. Raportas Rudolf Fischer.

Kiam mi en 1981 unufoje eniris la estraron de Germana Esperanto-Asocio (GEA), ni ne havis membrelevuon, nur informbultenon *Esperanto en F.R. Germanio*, kiun redaktis la membro-administranto Heinrich Nischwitz. Laŭ insisto de junaj aktivuloj la tiama estraro decidis, lanĉi novan membrelevuon. Bonŝance veterano Richard Reuchlin, iam dum jardekoj redaktisto de Germana Esperanto-Revuo, deklaris sin preta, transpreni la redaktan postenon. Tiel en 1982 aperis la unua numero de *Esperanto aktuell*, nigra-blanka, 24-paĝa, kun formato DIN A5.

Nomo uzurpita

La nomon *Esperanto aktuell* uzurpis GEA de la samnoma revuo de la najbara Aŭstra asocio, kies organo aperis ankoraŭ ĝis 2004. Poste la GEA-a *Esperanto aktuell* iĝis ankaŭ la Aŭstra, tiel ke la nomaj ĝemeloj kunfluis al revuo por ambaŭ asocioj.

La dissendadon faris ekde la komenco Richard Hirsch, unu el la plej fidelaj GEA-aktivuloj de la postmilita historio de GEA. Li plenumis tiun taskon – nuntempe apenaŭ kredeble – seninterrompe kaj absolute fidinde ĝis aŭtuno de 2000.

Esperanto aktuell havis kutime 20 paĝojn. Aperis 6 numeroj jare, sed jam fine de la unua jaro la redaktisto, kiu samtempe preparis la Germanan Esperanto-Kongreson de 1983 en Bad Säckingen, bezonis duoblan numeron 5+6 kun 36 paĝoj por reatingi la apertitmon.

En 1983 nia juna generacio transprenis la gvidadon de GEA. Fine de la jaro Richard Reuchlin transdonis la redaktadon al la germanisto d-ro Dirk Willkommen. Kompostadon kaj presadon faris HAPS (Hamburga Administra kaj Presa Servo), komisiono de Germana Esperanto-Junularo. En 1984 aperis 7 numeroj en regula ritmo, ili havis inter 24 kaj 32 paĝojn, foje kun interna 4-paĝa parto *Esperanto-Nachrichten*, pro ties koloro nomita „la flavaj paĝoj“. Tiuj estis elpreneblaj kaj povis servi kiel varbfolioj, bona ideo!

Progreso el Neumünster

Ekde 1985 *Esperanto aktuell* atingis rimarkeble pli altan teknikan kvaliton. Aperis 8 numeroj jare, kun kolora titolo, presitaj de la firmao Simonsen en Neumünster, loĝloko de la redaktisto. Tiu presejo estis fidinda partnero de GEA ĝis fine de 2005. La 8 numeroj havis


nun 28 paĝojn, ekde 1986 ofte ankoraŭ pli. La redaktadon de la „flavaj paĝoj“ transprenis ekde numero 1986/4 Wolfgang Schwanzer; tamen jam en numero 1987/5 ili aperis la lastan fojon. Ofte meze en iu numero ankaŭ aliĝiloj por Esperanto-aranĝoj estis alkrampitaj.

Kriza periodo

Ĝuste la jubilea jaro 1987 iĝis kriza por *Esperanto aktuell*. La ĝis tiam fervora redaktisto ne plu havis tempon, tiel ke ĝis septembro aperis nur 3 numeroj. En tiu premo la lingvisto Andreas Ludden el Münster transprenis la redaktadon. Li kapablis, ĝis fine de la jaro eldoni almenaŭ 4 pliajn numerojn, parte kun pli ol 40 paĝoj. Elzbieta Klünder el Steinfurt kontribuis per majstraj desegnaĵoj kaj grafikaĵoj. Dum 1988 ĉio iris glate (8 numeroj, inter 28 kaj 44 paĝoj), sed jam en 1989 la sorto de la redaktado el septembro adiaŭis la deĵoranta redaktisto, post nur du jaroj.

Per komputilo ATARI

Denove *Esperanto aktuell* devis esti savata. Franz Kruse aĉetis komputilon ATARI, ankoraŭ nur kun malgrandaj diskaj kaj pinglopresilo. Kuraĝa decido estis, ke mi, la vicprezidanto, subtenata de mia edzino Hedwig, transprenis la redaktadon. Bonŝance Elzbieta



Klunder restis en la teamo. Estis torturo, produkti per tiu simpla teknikaro revuon. Subite ne plu legeblaj diskoj neniigis kompletajn paĝojn, la daŭra kopiado tedis kaj konsumis tempon. Fine la aĉeto de konektebla durdisko solvis tiun problemon. Per streĉa laboro ankoraŭ ĝis fine de 1989 aperis pliaj 4 numeroj kun minimume 28 paĝoj.

Nun venis trankvila periodo ĝis fine de 1991. Regule aperis 8 numeroj, nun kun po 36 paĝoj. La titolbildo ricevis klarigan suban tekstlinion. Cetere nenio ŝanĝiĝis. La transdono de la redakta laboro ekde 1992 okazis planite kaj enorde.

La nova koncepto ekde 1992

GEA realigis nun novan koncepton: Aperis 8 numeroj jare, alterne 4 nur German-lingvaj (kiel informilo uzeblaj) kaj 4 Esperant-lingvaj, kun du apartaj redaktistoj. Por 1993 oni planis, atingi monatan ritmon, sed tio montriĝis tro ambicia. Novaj redaktistoj iĝis Frank Stocker, Freiburg, kaj Ulrich Becker, Berlin. La ekstero de la revuo rimarkeble ŝanĝiĝis: Ĝi estis nun grandformata (DIN A4), kun titolo kaj kadro de Esperanto-stelo en verda koloro. Ekde 1993 tiu grafikaĵo trovis sian finan formon, kun verdplena stelo. Ĉiu numero havis normalkaze 20 paĝojn, foje pli.

La periodo de redaktista fluktado

La ekzisto de du redaktistoj spertaj, sed ankaŭ junaj, tiel ke gravaj ŝanĝoj de la vivkondiĉoj estis normalaj, kondukis

al rimarkebla fluktado en la redaktaj postenoj. Tamen oni devas koncedi, ke *Esperanto aktuell* regule pluaperis, eĉ se foje kun prokrasto. Ekzemple numero 1997/7 atingis la legantojn maljam en 1998. Numero 1997/2+3 estis duobla, pro aldonita kompaktdisko, oni diris.

Por nomi la postenulojn de tiu periodo:

- German-lingva eldono: Ĝis numero 1995/1 Frank Stocker (por numero 1993/3 anstataŭita de vicprezidanto Rainer Heckhausen, Pleidelsheim); poste Karl-Ernst Salzmann, Memmingen, ĝis numero 1996/1; Jörg Birkefeld, Erfurt, ĝis numero 1997/5; fine Alfred Knapp, Bad Berka.

- Esperant-lingva eldono: Ulrich Becker ĝis numero 1994/4; poste Dirk Kretschmann, Bad Oldesloe, ĝis numero 1997/8 kun esceptoj de la numeroj 1995/8 kaj 1996/2, kiam anstataŭis lin Karl Sommer, Erfurt; ekde numero 1998/2 Marcus „Ziko“ Sikosek, Köln (komence kun Peter Hauser, Schneeberg), ĝis numero 1999/2; fine Alfred Knapp, Bad Berka.

Amasaj leteroj de legantoj

En tiu turbulema periodo okazis tre malhelpaj ekflamoj per artikoloj kaj amaso da leteroj de legantoj. Unue temis pri rasismo en Germanujo; poste kritikanto kondamnis *Esperanto aktuell* ĝenerale, aspekte kaj enhance: bela bato por honor-ofica redaktisto. Eĉ pli da ekflamoj provokis la tikla „recenzo“ de groteska pseŭdoplanlingvo „Pimperanto“,

kiun la redaktisto akceptis nur por eviti la riproĉon de cenzuro. Kiom trankvila (eble por kelkaj enuiga) estas la nuntempo de *Esperanto aktuell*! Problemoj de la tiamaj numeroj estis ankaŭ manko de fotoj kaj eĉ pli: lertaj grafikaĵoj, kiuj buntigu la iom tro sterilan bildon. Tio restis principe ĝis 2005.

Gravaj ŝanĝoj ekde 2000

Fine Alfred Knapp prizorgis la redaktadon de ambaŭ lingvaj eldonoj, duobla numero 1999/4+5 atestas lian streĉitecon. Necesis drastaj ŝanĝoj, kiuj validis ekde la jaro 2000: La GEA-estraro rezignis la koncepton de 8 numeroj kun po 4 unulingvaj. Ekde tiam aperis denove 6 dulingvaj numeroj, ĝis hodiaŭ.

Nun pli laŭ aspekto de gazeto

Ekde numero 2000/5 mi duan fojon transprenis la redaktadon, Alfred Knapp faris la kompostadon kiel „teknika redaktisto“. Mi forigis la palajn bildojn de la titolpaĝo kaj aspektigis *Esperanto aktuell* pli kiel gazeton: kun atentovekaj titoloj, kiuj donu apetiton, legi pli sur postaj paĝoj. La pres-indikoj (t.n. *Impressum*) aperis nun en paĝo 2. La kunlaboro kun Alfred Knapp estis teknike malfacila, korektado okazis per faksoj. Ekde la numero 2001/5 mi majstris ankaŭ la kompostadon, tiel ke Alfred Knapp povis retiriĝi, sed la sterila aspekto restis. Kion fari? „Kie mankas ĉevaloj, servas azenoj.“ Tamen sur la titolpaĝo reaperis jen kaj jen bildo. La presejo Simonsen ekde numero 2000/6 transprenis ankaŭ la ekspedadon.



► Speciala numero en 2001

Aprile de 2001 aperis speciala numero de *Esperanto aktuell* okaze de la „Eŭropa jaro de la lingvoj“. Frank Stocker en profesia maniero kompilis 44-paĝan numeron, kiu prezentas GEAn kun ĝia historio, kun regionaj kaj fakaj organizoj, kun listoj de la prezidantoj, honoraj membroj, ktp. Valora presaĵo, kiun mi ĝis hodiaŭ regule konsultas. Valorus eldoni aktualan similan verkon, sed GEA ĝis nun ne trovis kompetentulon, kiu pretas, elspezi tiom da tempo.

Trankvila periodo

Komence de 2002 malaperis la verda stelo de la titolpaĝo, anstataŭe venis la nova emblemo de simbola terglobo, almenaŭ kun malgranda steleto. Intertempe ankaŭ tiu lasta malaperis.

En la periodo post 2000 *Esperanto aktuell* tute regule aperis, kun minimume 20 paĝoj. Ekde 2004 *Esperanto aktuell* estas ankaŭ la membreto de Aŭstra Esperanto-Federacio. Ĉar mi planis, ekde 2007 denove kandidati por la GEA-prezidanta posteno, mi devis liberigi min de la redaktado, kaj bonŝance anoncis sin

profesiulo, Alfred Schubert, Weilheim, kiu transprenis la tutan produktadon de 6 numeroj de *Esperanto aktuell*, inkluzive presadon kaj dissendadon, tamen – tio estis nova – kontraŭ (modesta) salajro.

Progreso kaj financa krizo

La nova *Esperanto aktuell* plaĉis al ĉiuj. Ĝi havis koloran kovrilon kaj ampleksis minimume 24 paĝojn. Ĝis 2010 *Esperanto aktuell* ne plu kaŭzis problemojn. La GEA-bilanco de 2009 montris tamen, ke *Esperanto aktuell* simple kostis tro, ankaŭ ĉar la poŝtaj tarifoj daŭre plialtiĝis. Tio kondukis al tre malagraba paŝo, nome maldungi la deĵorantan redaktiston.

Esperanto aktuell en sia 30a eldonjaro

Komence de 2011 aperis *Esperanto aktuell* denove kun alia ekstero. La formato iom ŝrumpis, nome al tiu de la UEA-revuo *Esperanto*. Ĝi havas nun 8 kolorajn paĝojn el 32, kaj kunlaboras tuta teamo. Redaktisto estas Stano Marček el Martin/Slovakujo. Mi mem funkcias

kiel „antaŭredaktisto“, precipe por German-lingvaj artikoloj. Post elekto de kontribuoj laŭ movada vidpunkto, fikso de la amplekso kaj supraĵa prilaboro mi sendadas ĉion al la lektoroj. La rezulto iradas al la redaktisto, kiu enpaĝigas, elektas bildojn kaj ilustraĵojn. Post fina lektorado *Esperanto aktuell* iras al presejo en Martin. Tiu enpoŝtigas pakaĵon al Aŭstrujo kaj ekspedas la plej grandan parton per kamiono al firmao en Berlin, kiu dissendas fine la ekzemplerojn kaj interkalkulas kun la poŝt-organizo.

Gravas, ke *Esperanto aktuell* havas pliajn konstantajn kunlaborantojn, nome Uwe Stecher por la Aŭstraj paĝoj kaj por la rubriko „El la mondo“. Alia agraba novaĵo estas, ke Germana Esperanto-Junularo decidis, produkti 4 ĝis 6 paĝojn, kiel sian revueton *kune*, interne de *Esperanto aktuell*. Antaŭe *kune* kiel sendependa gazeto dum pluraj jaroj nur tre sporade aperis. Redaktistoj estas nun Miriam Hufenbach kaj Caroline Patzelt.

Per tiu ĉi numero finiĝas la unua jar-eldono sufiĉe sukcese kaj monŝpare. Espereble la bona kunlaboro ankoraŭ longe funkcios.